

Manlibro pri Instruado de Esperanto

*Pretigita de internacia teamo de lingvoinstruistoj, redaktita de Katalin Kováts
Eldonis: ILEI/Hago 2005. (2a eld.) - ISBN: 8096904264.*

Jen eble la plej signifa eldonaĵo de ILEI tra lastaj jaroj. En 148 paĝoj kaj kompakta formato, jen praktika gvidilo por instruistoj kaj instruantoj kiuj (vole aŭ preskaŭ kontraŭvole) trovis sin antaŭ la devo instrui nian lingvon. Unuflanke pedagogie kompetenta, aliflanke jen tre praktika verko kun konkretaj konsiloj. Ĝi levas multajn temojn kaj dilemojn kiujn vi mem frontos en instrua rolo. La verko havis elektronikan version antaŭ unu jaro, nun ĝi aperas post funda revizio kaj kompletigo en plaĉa papera eldono. La preskvanto estis nur 300, el kiuj plene duono jam forvendiĝis en UK.

La vendoprezto ĉe UEA kaj ILEI estas 7.50 EUR. Ĝi estas havebla de diversaj libroservoj. Mendu de ILEI ĉe *Stefan MacGill, Pannónia u. 30/1/6, HU-1136 Budapest, Hungario* aŭ stefan.macgill@gmail.com

Ĉe ILEI la prezo inkluzivas la sendokostojn, ĉe UEA ili estos aldonitaj. La verko estos la deviga teksto por la kurso pri situacia lernado okazonta en la seminario de ILEI/GEA en Herzberg, Germanio komence de oktobro (vidu la aliĝilon en IPR 2005/2). *Stefan MacGill*

Aperis en IPR/05/3.